



JuSKA 2014: la junulara kovejo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ



La gejunuloj sin preparas por la vespera programo.

Pasintoktobre ĉe bela natura feriejo “Batalo de Saratoga” en provinco Camagüey, en la centrorienta landlimo okazis, de la 9-a ĝis la 12-a de oktobro la 3-a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA 2014). Temas pri la Nacia Renkontiĝo de la Kuba Junularo, kiu okazas ekde la jaro 2011.

Ĉi-foje sub la ĉeftemo “Esperanto kaj Junularo”, ni celis komune pritrakti temojn koncernantajn ĉefe la kuban junularan movadon, sed inkluzivante ankaŭ la eksterlandan esperantan komunumon el kiu, laŭ mi, ni multon ankoraŭ devas lerni.

La programo estis bazita sur ludoj, prelegoj, kunsido de reprezentantoj de la diversaj filioj en la lando kaj vespera programo parte planita kaj parte spontanea. La gejunuloj krome havis eblecon fari la bazan kaj mezan ekzamenojn de KEA, tempon por bani sin en la bela rivero de la feriejo kaj komune resti en familia etoso.

Ni dankas al ĉiuj kiuj iamaniere helpis en la organizado kaj realigo de JuSKA 2014. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne konatiĝis kun esperantista reala etoso, vi ja scias, la momento estas nun! Ne hezitu kaj venu al venonta JuSKA, kiu certe okazos en 2015. Bonvenon al Kubo kaj al Kuba Esperanto Asocio.



Gonzalo Collantes preparas estontajn geinstruontojn.

Dudekjariĝo en Santiago de Kubo

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

La 6-an de decembro 2014, per ampleksa aranĝo, oni festis en Santiago de Kubo la 20-an datrevenon de la Provinca Filio (fondita la 9-an de decembro 1994), kie ĉeestis ĉirkaŭ 50 lokaj esperantistoj, inter kiuj pluraj el urbo Contramaestre, ankaŭ membroj de tiu kolektivo.

La aranĝo okazis en la ĵuse malfermita kultura institucio **Arte soy**, en la urbocentro, kaj ĝi komenciĝis per prezentado de enhavriĉa ekspozicio, konsistanta el pluraj fotoj kaj ĝeneralaj informoj pri la ekzisto de Esperanto (ekde la unuaj momentoj, en 1887, ĝis nun), krom la historio de la E-movado en Ameriko, Kubo kaj en tiu urbo (en 1907).

Sekve, ĉiuj ĉeestantoj translokiĝis al apuda salono, kie okazis solena programero, kun aktiva partopreno de la loka esperantistaro kaj ĉeesto de gastoj (Laura Zúñiga, funkciulino de la Ministerio pri Kulturo, pri neregistaraj organizoj en tiu provinco; Ana Ortega, historiistino de la Kataluna Asocio en Santiago de Kubo; kaj Juan R. Rodríguez, KEA-estrarano kaj historiisto de Eo en Kubo).

Tiu ĉi parto de la aranĝo konsistis el ĝenerala parolado pri la Provinca Filio, salutvortoj nome de la KEA-prezidanto kaj, inter aliaj eroj, disdono de atestoj (subskribitaj de li) al fondintoj kiuj ankoraŭ aktivaj, plejparte nuntempaj estraranoj surloke, kiel Julio César Tamayo Salas (prezidanto de la loka Estraro), Gonzalo Collantes García (ĝenerala sekretario, kaj ĉefa kunordiganto kaj organizanto de la aranĝo), Miosotis Planas Fajardo (plurjara kasistino), Guillermo Navarro Toledano (estrarano pri Instruado kaj Kulturo), Graciela Morgado, prezidantino de la E-grupo de Contramaestre; kaj Frances Guibert Sorzano, unu el la plej malnovaj E-instruistoj en tiu urbo, kiu lernis la lingvon en Havano dum la 80-aj jaroj.

Sekvis arta parto, kie partoprenis trobadoroj, deklamantoj, dancistinoj kaj la muzikensemblo Teamo Bachata, el Contramaestre, kiu regalis nin per pluraj tiutipaj kanzonoj kaj, ĝenerale, pliamuzigis la etoson, ja de la komenco emocia.

Fine, ĉiuj ĝuis tagmanĝon en restoracio de tiu institucio kaj kaptis la okazon por paroli kaj interkonatiĝi kun esperantistoj de Santiago de Kubo.

Dudekjariĝo aŭ centjariĝo?

Ĉe pluraj homoj, ankaŭ neesperantistoj, en Santiago kaj ĝenerale en Kubo, estiĝis dubo rilate al la tiel nomata dudekjariĝo, kiam ili konas ke la 18-an de oktobro 2008, oni festis la centjariĝon de Kuba Esperanta Societo, fondita en tiu urbo en 1908, kaj tion mi klarigas sube.

Sciatas ke la ekzisto de Esperanto en Santiago venas de decembro 1907, kiam oni fondis tie Catalanes Esperantistas de Cuba (Katalunaj Kubaj Esperantistoj), kiel filio de Espero Kataluna; kaj la agado de tiu grupo multe helpis la fondon de la unua tutlanda societo pri Esperanto en Kubo, sub la nomo Kuba Esperanta Societo, kio okazis la 18-an de oktobro 1908.

De tiam venas la agado por la Internacia Lingvo en Santiago, kun sufiĉaj dokumentoj kiuj montras tion en la sekvantaj jardekoj (eĉ kun aliaj pintaj momentoj en tiu teritorio), sed tio ne signifas kontraŭdiro en rilato kun la nuntempa dudekjariĝo.

Esperantistoj de Santiago de Kubo multe agadis en tiuj grupoj, sed krome kelkaj el ili membris aliajn, kiel la Societo Kuba por Propagando de Esperanto, ekde 1910 ĝis la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento. Aliaj aliĝis al la Kuba Esperanto-Asocio (1947-1956), kiel



Juan Ramón prelegas en la halo de Arte Soy.



Trobadoroj de Contramaestre riĉigas la artan programon.

Roberto Guerra Ibarra, kiu membris ĝin kiel estrarano, kaj estis la unua tradukisto de “Amu min multe” (de Gonzalo Roig), en 1954. Li, krom la sindediĉa laboro farita surloke, ankaŭ partoprenis plurajn aranĝojn en aliaj provincoj (ekz., en Camagüey, 1963, kune kun Raúl Juárez Sedeño), ktp.

Niaj arkivoj atestas la ekziston de esperantistoj de Santiago de Kubo en la okdekaj jaroj, kiel membroj de la nuna KEA (fondita en 1979), kaj pluraj kursoj en tiu epoko, kiam, laŭ la tiama Statuto, nur estis municipaj kaj provincaj estraroj (krom la Nacia).

La kategorio Provinca Filio aperis unuafoje en la Statuto de KEA aprobita en januaro 1992, kaj de tiam la Estraro de Santiago de Kubo multege agadis por krei ĝin en tiu teritorio, kio fine okazis la 8-an de decembro 1994. Do, dudek jarojn antaŭe. Ne estas kontraŭdiro.

Tra la spuroj de niaj klasikuloj

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

EDMON PRIVAT, 1889-1962. Sviso; profesoro, verkisto. Klasikaj studoj en Ĝenevo kaj Parizo, doktoriĝis pri literaturo. Lernis Esperanton en 1903, fondis kun Hodler la gazeton *Juna esperantisto*. Multege laboris por Esperanto; faris propagandajn vojaĝojn tra multaj landoj; estis prezidanto de UEA kaj redaktoro de *Esperanto*. Prezintis Esperanton al la Ligo de Nacioj k.a. Verkis franclingvajn specialistajn verkojn. Verkis pri la historio de Esperanto kaj Zamenhof. Verkis originale Esperantajn poemojn, dramon, rakontojn.



“Liaj ĉiuspecaj verkoj respegulas el stila vidpunkto kristalan, puritanan klarecon, elegantecon kaj en la historiaj kaj beletristaj verkoj tiu stilo atingas la plej altajn regionojn de la Esperanta literaturo. Ĉu la stilo, ĉu la diritaĵoj sentigas al ni, ke la verkisto de sia juneco vivas en la esperantista vivo, lia individuo estas nedisigebla de la esperantista agado [...] Kion ajn li verkas, la frazoj vivas, ni rekonas ĉiujn kolorojn de la vera vivo kaj lia verkista agado jam en frua epoko de la Esperantomovado influis la junan generacion por liberigi de la paper-odora, seka literatura tendenco.” / Ferenc Szilágyi en *Enciklopedio de Esperanto*, 1933.

Jen poemo verkita de Kálmán Kalocsay:

Rimpretetoj:

Edmond Privat – la dolĉa Vorto!
Plej mola ĉarmo kaj gracio!
Poeto de la Historio
Pri l' Majstro, kaj pri nia Forto.

La koron streĉas la risorto
De l' Nova Sento por misio.
Edmond Privat – la dolĉa Vorto!
Plej mola ĉarmo kaj gracio!

Pri l' papilia frosto-morto
Funebris kun melankolio,
Kun dolĉkompata melodio
Rakontis pri l' Ĝinevra sorto

Edmond Privat – la dolĉa Vorto!

19-a Zamenhofa metiejo: celoj kaj estonteco

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

De la 11-a ĝis la 14-a de decembro okazis la 19-a Zamenhofa metiejo organizita de la Esperanto-grupo en la feriejo Yacabo de la orienta provinco Guantánamo kun partopreno de proksimume 75 geesperantistoj el diversaj provincoj.

La evento arigis kubajn geesperantistojn entuziasme partoprenintaj la renkontiĝon, kies programo inkluzivis prelegojn, didaktikajn ludojn, paroligan kurson, instruistan trejnadon, perradiajn kontaktojn de la radioamatoroj, padumadon kaj viglajn kulturajn vesperojn, krom ĝui la belan naturon ĉe maran de la jam konata feriejo.

La organizantoj, Tirso Ávila Bory, Tania Laurencio Molina, Leonardo Luna Neyra kaj aliaj helpantoj kaj aktivuloj, multe laboris por garantii la bonan etoson kaj ĝuon de la partoprenantoj. La gejunuloj ankaŭ sentigis sin per sia viglo kaj aktiva partopreno en la diversaj programeroj. Ili estis reprezentitaj de la juna organizantino María Lisandra González Hurtado, kiu ankaŭ prelegis pri infektaj malsanoj sekse transmiseblaj.

Okazis tradicia modparado kaj elekto de la plej popularaj partoprenintoj, vira kaj virina, nome Landy Acosta Perdomo kaj Ismary Lezcano García; ankaŭ la popularecon gajnis Camilo Miranda Ugás, el Santiago de Cuba.

Alia bela momento estis la renkontiĝo kun la infanoj de la baza lernejo Blas Roca el la samnoma komunumo kiuj dividis dialogon kun la partoprenantoj en la metiejo pri la lerneja vivo en la komunumo kaj prezentis primedian teatran verkon. La E-Grupo en Guantánamo rolas baptopatron de la koncerna lernejo kies infanoj interesiĝas pri protekto al la naturo kaj informiĝas pri la valoroj de la IL.



Sendube la renkontiĝo estis bona okazo por dividi spertojn, ĝui la naturon kaj la esperantistan etoson preparitan de teamo kiu jam mature kapablas organizi ĉion necesan por bela restado kaj plenumo de la riĉa programo.

Mi ne povas, tamen, ne diri, ke daŭre pendas sur ili granda defio rilate al la lingva nivelo de la evento. Ili ja konscias pri tio kaj certe la celo de ilia kunveno kun la reprezentantoj de la filioj tie ĉeestantaj, estis ĝuste priparoli mankojn kaj agad-direktojn, kio ja salutindas. Ni ĉiuj povis paroli pri tiu temo tiel ke pli kaj pli la Zamenhofa metiejo fariĝu modela ankaŭ lingvonivele, kio multe altigos ĝian prestiĝon cele al internacia partopreno kaj disvastiĝo. Ni ĉiuj laboru por tio!

Dume, mi invitas vin kune labori por ke la venonta metiejo en la bela urbo Baracoa, estu plia defio atingebla por la bonfarto de la movado ne nur en la orienta regiono de Kubo, sed tra la tuta lando!

Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio

ISMARY LEZCANO GARCÍA, Havano



★ Preskaŭ ĉiutage mi vivas en Esperantujo, kiel sekretariino de KEA, kie mi helpas al la movado en nia lando. ★ Mi instruas kaj senĉese laboras por ke miaj gelernantoj fariĝu aktivaj membroj de la asocio kaj enamiĝu al la lingvo, sendube mi amegas ilin. ★ Mi partoprenas aktive en diversaj aranĝoj kaj partoprenigas ilin per deklamado kaj korusoj. ★ Respondeculo pri ILEI sekcio en Havano nuntempe mi finpretigas ĝian regularon. ★ Verkante poemojn kaj rakontojn mi gajnis premiojn en naciaj konkursoj. ★ Mi havas korespondamikojn kaj radioamatoras, fakte mi estas la kasistino de la Speciala Radio-Klubo CO9BNN. Mia celo estas plibonigi mian lingvokapablon por esti pli bona esperantistino.

ILEI raportas

El la raporto farita de la ILEI-prezidanto Mireille Grosjean pri la agado de la Ligo dum la lastaj tri monatoj ni prezentas resumon:

Revuoj

IPR *Internacia Pedagogia Revuo* plu aperas sub la gvido de Jozefo Nemeth, ekde 1994. Pro tio ni dediĉis la lastan numeron de 2014 al li. Nova rubriko aperas: ILEI-UNESKO.

JA *Juna Amiko* aperos kvarfoje dum 2015 laŭ decido de la Komitato de ILEI en julio 2014. Ni preparas tion. Stano Marček bonege laboras.

La 48-a Konferenco 2015 en Belgio okazos de la 17-a ĝis la 25-a de julio en Oostende, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Agema loka grupo eklaboris kuraĝe kaj efike kunlabore kun nia estrarano pri Konferencoj Radojica

Petroviĉ. Okazos simpozio kaj lingva festivaĵo. Akceptita konferenca temo estas: Grandan pacon post la grandaj militoj. Kiel novaĵo en la konferenca programo estas proponataj kursoj por komencantoj.

UNESKO

Nova rubriko aperas en IPR: ILEI-UNESKO, por flegi la kontaktojn, konigi Unesko-n al niaj membroj, stimuli la kontaktojn en la unuopaj landoj. Rubriko pri Unesko ekaperas en nia retejo *ilei.info* en la paĝo "Dokumentoj". Flegi la kontakton kun Unesko estas decido de nia Komitato en Montevideo.

Premio Mauro La Torre

Laŭ propono de familio La Torre prezentiĝas eblo por fakuloj, esploristoj, kandidatiĝi pri tiu premio. La organizantoj estas familio La Torre kaj ILEI. La estraro de ILEI diskutis pri regularo kaj voĉdonis. Nun la dokumento aperas sur nia retejo kaj anonco aperis en la revuo *Esperanto* en paĝo 211 de la oktobra numero. Detala priskribo aperis en novembro.

"Ni Savu Niajn Semojn".

Ni planas demandaron por kolekti precizajn sciojn pri niaj bibliotekoj tra la mondo. La projekto "Ni Savu Niajn Semojn" estis prezentita dum Konferenco KAEST en Modra, Slovakio.

Fotokonkurso

"Fotu nekutime!" Por varii la fotojn de la diversaj kursoj kaj kunvenoj ILEI lanĉis fotokonkurson. Ni ricevis dek fotojn. Ĵurio el Huang Yinbao "Trezoro" kaj Brian Moon deĵoris kaj decidis pri premioj. La premiita foto aperis en IPR 2014/4.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu
www.esperanto.cult.cu



31-a KOMITATKUNSIDO Kuba Esperanto-Asocio

Havano

30-31 januaro 2015



RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj

www.radiohc.cu/eo



esperanto.cu estas trimonata eldonajo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo www.esperanto.cult.cu. **Redaktis:** Maritza Gutiérrez, Alberto F. Calienes, kaj Javier Ramos.
Enpaĝigis: Y. Mayol kaj Alberto F. Calienes.

